

Vivo de Lanti, verko de Eddy Borsboom, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 675, 1976.09.15 & 17 & 18

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni recenzis la libron Vivo de Lanti de Eddy Borsboom. Aldone al tiu ĉi tre interesa biografio de la fondinto de SAT aperis por la unua fojo la verketo **Fredo**, aŭtobiografia romano, kiun Lanti ne havis la tempon finverki. Temas pri ĉapitraro stile kaj enhave tra varia. Apud veraj juveloj de nia originala literaturo troviĝas mallertaĵoj, kiuj atestas, ke la aŭtoro ne havis la tempon poluri sian verkon. Ni citos al vi hodiaŭ eron el la ĉapitro ĝuste titolita **Fredo**, bedaŭrante ne povi laŭtlegi pli el tiu ĉi literatura perlo :

A.- « En kampo proksima de l'farmdomo fluis rivereto. Tie estis elfosita relative granda akvujo, kien Klema kutimis iri por lavi tolaĵojn kaj vestojn. Iun tagon ŝi kaŭris tie ĉe la bordo de la akvujo kaj purige laboris. Fredo estis kun ŝi kaj rigardis tolaĵojn, kiuj naĝis sur la akvo. Lia kapo estis vestita per tute nova ĉapeto kun banto ĉe la flanko kaj la patrino rekomendis al li zorgemon pri tiu beleta kapvesto. Sed ial eniris la kapon de la knabo la ideo ĵeti la ĉapeton sur la akvo ! Klema tuj ekstaris, grumblis, per helpo de stango kaptis la naĝantaĵon kaj vigle skuinte ĝin remetis sur la kapon de Fredo. «Ne denove faru, aliel domaĝos al ci la sidvangoj», minace eldiris Klema.

Cl.- La admonito restis dum momento senmova kaj silenta. Sed baldaŭ jen denove la ĉapeto sur la akvo. Tiam la promesitaj batoj falis per la vigla mano de la ekkolerinta patrino :

A.- « Nu ! ĉu ci rekomencos ? Se jes, tiam mi fermos cin en ŝrankon. Kia maliculo ! Kia obstinulo ! Promesu, ke neniam plu ci malobeos ; ĉu ci aŭdas ? »

Cl.- Fredo akceptis la admonojn kaj minacojn silente ; li kunpremis la dentojn kaj nenian promeson faris. Ĉe la konstato de tia obstino, Klema ekscitite kaj ploreme reiris al sia laboro. Sed ŝi strabe observis la bubeton. Pasis kelka tempo, dum kiu ŝajne li rezignis sian intencon. Tamen tiel ne estis ; la obstinulo kaj malobeemulo ankaŭ kaŝobservis la patrinon kaj tuj kiam li vidis, ke ŝi estas tre okupita per sia laboro, li por la tria fojo ĵetis la ĉapeton en la akvujojn. Tiam Klema fuzioze ekstaris, ekkaptis la malobeinton, portis ĝin ĝis la domo kaj fermis en malnovan grandan ŝrankon, en kiu Johano kutimis deponi plej diversajn objektojn.

A.- Fredo tiam kriadis, kolere batalis per la piedoj kontraŭ la pordon, sed nenio helpis ; li devis kaŭri tie dum pli ol unu horo, ĝis la patro reveninte al la domo kaj aŭdante liajn ĝemojn liberigis lin. Kiam Klema siavice revenis, ŝi rakontis pri la obstina malobeemo de la knabo.

Cl.- « Ci petu pardonon al cia patrino », diris Johano. Fredo ne volis. Li ploris, singultis, sed neniun pardonpeton eliris el lia buŝo, malgraŭ insistaj admonoj de l'patro. Fine ĉi tiu lasta ankaŭ ekkoleris kaj Fredo denove eniris la ŝrankon. Tiel li restis ŝlosita dum eble du horoj. Li ne plu kriis, nek plendis, nek batis per la piedoj, sed ankaŭ ne petis pardonon. « Tiu knabo havas lignan kapon, veran lignan kapon », diris Johano.

A.- « Ne estas mia infano », diris Klema, kiu jam ne plu sentis koleron, sed kompatis la enfermiton ; « li certe estas ciganido. »

Cl.- Fine la patro senvorte liberigis la obstinulon. La ligna kapo de Fredo estis iom kontuzita kaj doloris. Nata, kiu ĵus revenis de la lernejo kaj vidis la malbonan staton, en kiu troviĝis la frateto, kompatis kaj mildvoĉe diris al li bonajn karesajn vortojn :

A.- « Estu bonkondata, Freĉjo... Kial do ci ĉagrenas panjon ?... Estu bona, frateto, kaj mi petis por ci pardonon... Ĉio baldaŭ estos forgesita. »

Cl.- Ĉe la karesoj de Nata, Fredo ekplorete kaj propramove, decide li iris al la patrino kaj petis mem pardonon. Ŝi tre volonte metis finon al tiu malagrabra sceno kaj la tuta familio post iom da tempo retrovis harmonian staton.

A.- Tiu okazintaĵo estis la unua memoraĵo de Fredo : la naĝanta ĉapeto kun verda rubando kaj la granda, malpura ŝranko gravuriĝis por ĉiam en lia memoro. »

Cl.- Vi aŭdis Radion Svislando. Claude kaj Andrée Gacond legis al vieron el la ĵus eldonita aŭtobiografia romaneto **Fredo** de Lanti, kiun vi trovos aldone al la libro **Vivo de Lanti** de Eddy Borsboom. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012